

INTERNACIA

PEDAGOGIA REVUO

IPR

**Eldonata de Internacia Ligo
de Esperanto-Instruistoj**

ILEI

Jarkolekto 6

N-ro 1, 1976

Pizo, Italujo

Enhavo	Paĝo
Rektoro Helmut Sonnabend - La lerneja eksperimento de ILEI en ĝia dua Eŭropo-regiono	1
D-ro Prof. Ivo Lapenna - Kontraŭ rasismo en edukado	7
D-ro Prof. Ivo Lapenna - La ideo de interŝtata konvencio pri enkonduko de Esperanto en lernejojn: klopodoj en la pasinteco, eblecoj en la nuntempo	16
*** Transpreni sian laboron	koverto 3

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)

Oficiala organo de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)
Aperas trifoje jare

Provizore redaktis: G. Turin
43. rue E. Magnin
F - 25300 Pontarlier

Kontoj: 1.) ILEI-IPR
25.28.71.464-40
Bank Mees & Hope NV
Rotterdam Coolsingel 93
2.) Helmut Sonnabend - Sonderkonto
Poŝtĉekkonto n-ro 3245 66-309
Hannover

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI, escepte nemembroj de ILEI povas pagi al la supre indikitaj kontoj.

I P R - Fonduso

Bonvolu helpi per via donaco al diversaj celoj de IPR-fonduso: finance helpi al IPR-ebligi abonojn en landoj havantaj valutajn problemojn-kreado de infanliteraturo-verkado de pedagogia literaturo.

Bankkonto: ILEI-IPR (fonduso), n-ro 25.28.71.464-40, Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, Rotterdam.

La lerneja eksperimento de ILEI en ĝia dua Eŭropo-regiono

de Helmut Sonnabend, Germanujo

Iam Esperanto-historiisto skribos pri la nuna periodo de ILEI kaj verŝajne nomos ĝin la jardekoj de Esperanto-lernejaj eksperimentoj. Kaj li certe nomos la periodon decida paŝo por la enkonduko de Esperanto en la lernejojn.

Ni anticipu: ĝis la fino de la jarcento Esperanto estos instruobjekto en ĉiuj lernejoj en Eŭropo, studobjekto en multaj universitatoj kaj grandparte disvastigata en ekster-eŭropaj lernejoj.

Utopio aŭ fakto?

La moderna ILEI ĉesis kun sia memsufiĉo kaj malfermis sin al la mondo, kia ĝi estas. Pluraj oficialaj instancoj jam konas nian organizaĵon, ĉu registaraj ministroj, ĉu sindikatoj, ĉu UNESKO, ĉu lernejoj administracioj aŭ neesperantistaj organizaĵoj kiel ekz. AEDE. Tiu ĉi laboro estos laŭplane daŭrigata kiel nunjare en San Marino.

Jam planas ILEI konferenci aŭ estrarkunsidi en foraj landoj. La metodoj kaj strategioj konstante pliboniĝas. Kiam ILEI ankoraŭ ne estis nominda faktoro por decide evoluigi Esperanton, estis gekolegoj el Hungarujo, Bulgarujo, Jugoslavio, Italujo kaj Aŭstrujo, kiuj kunvenis en 1968 en Maribor por konstati la instruan evoluon de Esperanton en la unuopaj landoj. Ili analizis la eblecojn de kunlaboro kaj decidis nomi sin *Kunordiga Pedagogia Konferenco*.

Kaj fakte estis la kondiĉoj de kunlaboro avantaĝaj: konstanta leĝpropono pri enkonduko de Esperanto en lernejojn en Italujo, intensa preparado de Esperanto-instruistoj en Bulgarujo, universitata studado de Esperanto en Hungarujo, lerneja leĝo en Aŭstrujo kaj lernejoj aktiveceblecoj en Jugoslavio.

La decida konferenco estis la tria en la jaro 1970 en Maribor. Krom geinstruistoj el la kvin landoj partoprenis oficialaj reprezentantoj el la unuopaj landoj. Ili donis la aprobon kaj la aŭspicio al unika lerneja eksperimento. La reprezentantoj ankaŭ akceptis la sciencan gvidadon pere de prof. d-ro István Szerdahelyi de la Universitato Eötvös Lorand, Budapeŝto.

Partoprenis al tiu ĉi eksperimento jenaj lernejoj klasoj:

el Bulgarujo	10	klasoj
el Hungarujo	5	klasoj
el Italujo	4	klasoj
el Jugoslavio	11	klasoj.

Kvankam la aŭstra reprezentanto informis la ŝtatan instancon, la aŭstraj gekolegoj ne sukcesis ekigi sian eksperimenton.

Esenca trajto de la eksperimento estis la paralelaj klasoj, en kiuj oni instruis alian fremdan lingvon. Tiel paraleliĝis klasoj, en kiuj estas instruataj la franca, aŭ la germana, aŭ la angla aŭ la rusa lingvoj.

Estis pruvende, ĉu Esperanto sub similaj kondiĉoj kiel por aliaj fremdaj lingvoj laŭ tempo, laŭ instrumendoj — do, tute sub normalaj cirkonstancoj — havos pli altajn lernefikojn ol la aliaj instruitaj lingvoj. La samtempa edukado al internacieco donis al la eksperimento apartan rangon. La internacia lernejo en Primoŝten, en kiu partoprenis pli ol cent infanoj el la eksperimentaj klasesoj sub gvidado de kolegino Anja Hurĉak, konfirmis plene la antaŭvidojn.

La scienca kaj dokumenta materialoj nun prepariĝas kaj baldaŭ estos haveblaj por ĉiuj interesitoj: eldonos KOK, s-ro Ivan Bratoš, Meljska c 38, 62000 Maribor, Jugoslavio.

La estraro de ILEI ne pretervidis la gravan laboron de sia regiono I kaj metis ĝin en la ĝeneralan laborplanon de la Ligo. La aŭtoro de la raporto partoprenis ekde la tria konferenco ĉiujn aliajn konferencojn kaj detale studis kaj analizis la labormetodojn kaj organizadon. Pluraj ILEI-konferencoj dediĉis sian laboron al la demando organizi aliajn eksperimentojn. En sia konferenco en Sonnenberg 1974 ILEI starigis la bazan principaron. Interalie ĝi esploris la lingvan diversecon por determini lingvajn grupojn, taŭgaj por lernejoj eksperimentoj. Alia aspekto estis la demando, kigrade eblas internaciigi lernolibrojn kaj samtempe konsideri nacilingvajn strukturojn. Esplorante la nunan lernejan situacion rilate lingvojn, la ILEI-konferenco decidis sugesti Esperanto-eksperimentojn ĉefe en la primaraj ŝtupoj de la lernejoj, t.e. la unuaj kvar klasoj de la lernejo - kelkfoje la unuaj ses klasoj. Postaj klasoj estas ĝenerale tro ŝarĝitaj per aliaj fakoj, ofte ankaŭ lingvaj.

Esperanto-eksperimentoj en klasoj, en kiuj jam estas instruata iu alia fremda lingvo ne povas utili al niaj intencoj. Ne estas dubo ke multaj lernantoj ne kapablas lerni la kutimajn fremdajn lingvojn; nur - kiam aldoniĝos nova fremda lingvo - kompreneble kulpos la troa ŝarĝo pere de la Internacia Lingvo Esperanto.

Alia premiso estis la demando pri la instruisto. Li kaj ŝi nepre devas esti en la lingvo, ne ekster. Estas fatala eraro opinii, ke supraĵa scio pri Esperanto sufiĉas kaj tiel riski lernejan Esperanto-eksperimenton. Nek pedagogia teknologio, nek fervoro povas tie ĉi helpi.

ILEI nepre devas aranĝi internacian seminarion almenaŭ 3 semajnan por zorgeme prepari instruistojn al la lernejoj Esperanto-eksperimentoj.

Ĉiu zono, ĉiuj regionoj devas unue plenumi la unuarangan taskon trovi la plej bonajn instruistojn de Esperanto. Alie la tuta eksperimento restos nur ia diletanta agado.

La ILEI-konferenco en Maribor en la jaro 1974 donis jam la organizajn kondiĉojn por sekvantaj eksperimentoj. Monda organizaĵo kiel ILEI nur tiam sukcese povas plenumi siajn taskojn, kiam ĝi ankaŭ konsideras la geografian situon. La kondiĉoj por instrui Esperanton en Afriko estas tute aliaj ol en Aŭstralio, kaj en Azio ekzistas aliaj kondiĉoj ol en Eŭropo. Tio signifas, ke ĉiu zono mem devas decidi pri la realigo de Esperanto-instruado en la lernejoj. Sed ne nur la zonoj sed ankaŭ la regionoj ne tutsimple povas imiti la celfiksadon de aliaj regionoj.

Tiel ekzemple regiono I en la eŭropa zono kolektis amason da spertoj. Ilin nur imiti certe signifus preterantenti la donitajn realaĵojn. Por regiono II en la zono Eŭropo leviĝas kelkaj problemoj - pri kiuj oni devas paroli - ; al ĝi apartenas jenaj lingvoj: franca, nederlanda, germana kaj eksterordinare la greka.

Komisiite de la estraro kaj komitato de ILEI la aŭtoro jam tre frue komencis esplori la eblecojn kaj kondiĉojn ekigi lernejan eksperimenton en la novfondita regiono II en la zono Eŭropo. La unua prepara konferenco okazis en Antverpeno dank' al la sindona klopodo de s-ro Haazen. Tie la konferenco nur evidentigis la eventualajn eblecojn por komuna eksperimento. La dua regiona konferenco okazis en Hannut en Belgujo, 1974. Tie nur konfirmiĝis la decido realigi komunan lernejan eksperimenton sen akcepti jam konkretan enhavon.

En tiu ĉi nebula stato venis ekpuŝo el Bonn, Federacia Respubliko Germanujo. Respondeculo de Scienca Ministerio aludis la deziron, ekscii pli pri Esperanto per modela lerneja eksperimento en iu federacia lando de la germana respubliko. Koincide estis alia evento. En Malsupra Saksio/Germanujo publikiĝis nova lerneja leĝo. El la multaj paragrafoj interesas nin esperantistoj aparte la paragrafo pri «lernejaj eksperimentoj». Ĝi tekstas:

Ĉiu lernejo havas la rajton proponi lerneajn eksperimentojn.

Tri lernejoj en la federacia lando (pli bone tri esperantistaj instruistoj) decidis apliki la novan leĝon. Por ricevi la oficialan permeson por eksperimentado, pri la proponita eksperimento unue devas konsenti la gepatroj de la koncernaj klasoj. Poste decidis la Granda Konferenco (geinstruistoj, gepatroj kaj gelernantoj). Post tiu proceduro la deputitoj de la komunumo devas esti aŭdataj. La decidoj de la tri grupoj estas aprobendaj fare de la lerneja inspektoro. Finfine la tuta dokumentaro iras al la registaro, kiu, post pozitiva ekzamenado, proponas al la ministerio la oficialan permeson.

Precize la priskribitan vojon iris rektorino Karin Ruff, lernejestro Günther Peek kaj rektoro Helmut Sonnabend.

Feliĉe ILEI povis prezenti internacian lernejan eksperimenton.

Aliĝis		
Belgujo	: s-ro Sondervorst, St. Gerard	16 gelernantoj
Francio	: s-ro Le Magadure, Hennebont	29 "
	: s-ro Benistant, Le Mans	16 "
	: s-ro Micond, St. Colombe	25 "
Nederlando	: s-ino Mensen, Soest	21 "
	: s-ro Rolandus-Hagedorn, Waalwyk	30 "
	: s-ro van Tol, Wormer	23 "
Greklando	: s-ro Sakellaropovlos, Ateno	90 "
Germanio	: s-ino Ruff, Peine	24 "
	: s-ro Peek, Balge	27 "
	: s-ro Sonnabend, Dollbergen	26 "

Unu el la kondiĉoj estis la nomumo de scienca akompanantaro. ILEI-regiono II prezentis jenajn personojn:

D-ro Aŝvinikumar, House No. 408, Indian Inst. of Technology
Kampur 208016, U.P./Hindujo

Prof. d-ro Helmar Frank, 479 Paderborn, Brochhöfe 2, Germanujo

S-ino Habig, lerneja inspektoro, Schulamt, 479 Paderborn, Germanujo

Prof. d-ro Hischer, 46 Dortmund, Pädagogische Hochschule, Germanujo

Prof. d-ro Hrستیć, Viša Ekonomska Škola, Radničko ŝet 18,

YU-58001 Split, Jugoslavio

Prof. d-ro Janton, Faculté des Lettres Université de Clermont,
F-63000 Clermont-Ferrand, Francujo

Prof. d-ro Lapenna, 77 Grasmere Ave., Wembley, HA9 8TF, Britujo

D-ro Maitzen, Auf dem Backenberg 3b, 463 Bochum, Germanujo

S-ino d-rino Meder, Heiersmauer 71, 479 Paderborn, Germanujo

Prof. Piepho, Kantstr. 4, 6301 Pohlheim 1, Germanujo

Prof. d-ro Ruprecht, 3 Hannover, Pädagogische Hochschule, Germanujo

D-ro Sherwood, 507 S. Draper, Champaign Ill. 61820, Usono

Prof. d-ro Szerdahelyi, Legénybirtó 9, 8em., 24, Budapest 15, Hungarujo

Prof. Weeser-Krell, Herbramer Weg 9, 479 Paderborn, Germanujo

La prezidanto de ILEI skribis oficialan leteron al la membroj de la konsilantaro:

Tre estimataj gesinjoroj,

mi tre ĝojas, ke mi povas saluti vin kiel Sciencon Konsilantaron pri la Esperanto-lerneja eksperimento en la Primarŝtupo. Organizado de ĉi tiu lerneja eksperimento estas la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kiu interkonsentite kun la Malsuprasaksia Ministerio ricevis la rajton realigi oficialan eksperimenton. Krome partoprenis klasoj en Francio, Nederlando, Belgio, Britio (kiu poste ne partoprenis) kaj Grekio, entute 10 klasoj. Ekde la 1-a de oktobro 1975 ĉie la eksperimento komenciĝos. La eksperimento estas limigita je 140 horoj. La aldonita materialo informas vin pri la didaktika koncepto por la unua jaro. La lernejoj ebligas objektivan testanalizon. La rezultojn mi regule al vi sendos. La pozitiva eksperimento devus gvidi al larĝa diskutado pri ĝenerala instruado de Esperanto en la primara lernejo.

Sincere

via H. S.

Kompreneble ILEI informis ĉiujn oficialajn instancojn de la partoprenantaj lernejoj.

Estis ankaŭ alia feliĉa cirkonstanco: la prorektoro, prof. d-ro Ruprecht, de la Pedagogia Universitato de Malsuprasaksio simpatias kun Esperanto el nete raciaj motivoj. Laŭ lia opinio Esperanto malfermas la ŝancon komuniki siajn ideojn al aliaj kaj lerni pliajn fremdajn lingvojn.

Je la dato de la 29-a de Julio 1975 sub la signo 301 MV 26-1/2 skribis la Malsuprasaksia Kulturministro:

Al sinjoro

rektoro Sonnabend

Elementa kaj Sekundara Lernejo

3161 Dollbergen

Koncernas: Lerneja eksperimento kun Esperanto en 3 elementaj lernejoj de la lando Malsuprasaksio (Niedersachsen)

Tre estimata sinjoro Sonnabend!

Mi informas vin, ke la lerneja eksperimento «Esperanto en la-Elementa Lernejo» estas aprobita. Tio validas por la elementaj lernejoj: Dollbergen, Balge kaj Froebel-lernejo, Peine.

Subskribo

En sia dua dekreto de la 4-a de oktobro 1975 la Ministro skribis (301 MV 26-1/1):

Koncernas: Scienca akompanado de la lerneja eksperimento «Esperanto en la Elementa Lernejo».

Tre estimata sinjoro Sonnabend!

Mi komisiis vin, transpreni la gvidadon kaj taskojn de kunordiganto de la modela eksperimento ĉe la Froebel-lernejo en Peine, la elementa lernejo Balge kaj la elementa kaj sekundara lernejo Dollbergen.

Subskribo

Jam iom poste montriĝis, ke tiu ĉi lerneja eksperimento ne nur havas akcesoran signifon, sed sur la malproksima fono reliefigas la demando, ĉu eble Esperanto povos anstataŭi la anglan lingvon en la elementa lernejo. Naskiĝis nova nocio: *lingva orientiĝo*.

Ĝi efektive povus fariĝi la «Sezamo malfermiĝu!» Supraĵe dirite en bilda formo: ni plantu Esperanton en la elementan lernejon (duaj ĝis sesaj klasoj), el tiu ĉi radiko povas kreski la arbo etendanta la branĉojn en la tutan sistemon de niaj lernejoj.

Antaŭ ol nun estos priskribitaj esencaj detalaĵoj de la eksperimento en regiono II, bonvolu akcepti gravan sugeston. Por apogi la lernejan eksperimenton la estraro de ILEI kunsidis en Hanovro/Malsuprasaksio, vizitis ĉiujn gravajn instancojn kaj tiel donis la moralan internacian bazon. Ĝi laŭ via invito certe venos post lokaj preparoj ankaŭ al via regiono (ekz. al Kopenhago, Stokholmo aŭ Oslo, aŭ Helsinko) kaj vizitos la koncernajn instancojn.

Jen nia enhava lerneja koncepto:

Ĉiuj partoprenantaj gekolegoj ricevis jenan leteron (partan eldiraĵon): karaj gekolegoj;

mi havas la grandan plezuron, saluti vin kiel kunlaboranton en nia dua serio de lerneja eksperimento. Por du jaroj vi apartenos al internacia kolegio kaj internacia lernejo. Nia oficiala nomo por la daŭro de la eksperimento estu:

I. L. E. I.

Lerneja Eksperimento - Esperanto

II-a Regiono

Subskribo

Informitaj pri niaj ĝeneralaj celoj estis ĉiuj oficialaj instancoj (pere de niaj sekcioj de la partoprenantaj landoj):

La eksperimento donu la eblecon studi:

- 1) la pli bonan lern-efektivigon kaj ekonomion kompare al la lernado de aliaj fremdaj lingvoj,
- 2) kiel sekvon de studado de Esperanto pli intensan lernadon de la gepatra lingvo,
- 3) la pli bonan akceladon de la legkapabla kaj ortografia evoluado ĉe ĉiuj infanoj, sed aparte de tiuj, havantaj ĉi-koncernajn lernproblemojn,

- 4) pli bonajn lernŝancojn ĉe la lernado de la aliaj fremdaj lingvoj,
- 5) kreskantan konscion rilate integriĝon de Eŭropo ĉe ĉiuj partoprenantaj personoj: ĉu lernantoj aŭ instruistoj.

Alia grava demando estis la elekto de lernolibro. Montriĝis, kvankam jam estas multaj diversaj lernolibroj por infanaj lernantoj, ke ni ne facile trovis taŭgan prore junaj infanoj. La unua kondiĉo por la lernolibro estas ĝia internacieco kaj proksimo al infana aĝgrupo. Ni elektis «Sub la verda standardo» de Korte. Malgraŭ sia malnoviĝo rilate al modernaj pedagogiaj konceptoj la libro tamen donas solidan bazon (ĉiukaze oni povas adapti ĝin al moderna koncepto). Same pozitive estas, ke Korte skribis «pedagogian gvidilon» enhavantan bonegajn metodajn sugestojn kaj konsilojn.

La tasko estis, reformi la enhavon de la lernolibroj I kaj II en modernan pedagogian koncepton.

La lerneja eksperimenta koncepto ampleksas tempe dum unu lerneja jaro 70 horojn. (Jen nur estas priskribita la unua jaro, ĉar la dua esta analoga) Dum la 70 horoj la infanoj lernas 289 leksemojn, 66 gramemojn, 21 gramatikaĵojn kaj 34 frazelementojn. La tuta lingva materialo estas dividita en 20 lecionoj. Al ĉiu leciono estas aldonita, lernceloj. Ili estas por la irado de la tuta eksperimento tre gravaj, ĉar nur ili povas objektivigi unue nian instruadon kaj due la lernadon. Jam por gekolegoj de la eksperimento la kompareblecoj estas bezonataj por ekkoni la lernpozicion de iliaj klasoj. Ankaŭ por la ĝenerala observado de la eksperimento la lernceloj donas scienca bazon. Por ĉiuj mezuradoj kaj testoj la demandoj kaj taskoj estas formulitaj surbaze de la atingitaj celoj. Ellaboritaj estas entute 134 lernceloj, kiuj respondas al lernata lingva materialo. Ĉiuj demandoj laŭ pedagogiaj, didaktikaj, metodaj kaj organizaj vidpunktoj estis kompilitaj en unu aparta kajero. Ĝi estas la fundamento de la komuna eksperimento.

Regulaj testoj akompanas la instruadon kaj donas informojn pri vortkono, vortscio, pri ekkono kaj aplikado de frazelementoj kaj -strukturoj, pri la kapablo formi frazojn kaj ankaŭ pri la scipovo de la ortografio. La intertempaj rezultoj ĉiam estas disponigitaj al ĉiuj gekolegoj. Tiuj ĉi rezultoj jam taŭgas kiel informa materialo ĉe gepatroj, lernejoj, inspektoroj kaj ankaŭ por gazetoj.

Alia grava aspekto estas la kontaktoj inter la infanoj. La kontaktoj servas al pluraj taskoj. Jam dekomence la infanoj devas havi la senton de solidareco kun aliaj, kiuj lernas la saman lingvon. La malgrandaj leteroj, la desegnaĵoj, la lokaj memoraĵoj, la fotoj, la oftaj salutvortoj vekas amikecon kaj internaciecon. S-ro Le Magadure transprenis la tre gravan taskon kaj ellaboris detalan planon. Momente havas ĉiu klaso sian ĝemelan klason. Planota estas nun Internacia Lernejo je la fino de la dua eksperimenta jaro. Per ĝi estu atestata la praktika funkciado de Esperanto.

Ĉiuj rezultoj de la testoj kaj mezurado estos je la fino de la eksperimento esplorataj kaj analizataj unue laŭ landoj kaj poste kunmetataj en scienca resumado. La membroj de nia konsilantaro prijuĝos la antaŭmetitan eksperimentan materialon. Tiam lernejoj instancoj, pedagogiaj altlernejoj kaj ministerioj ricevos la kompilitan rezulton.

ILEI esperas kiel sekvo de sukcesplena eksperimento, ke la lernejoj eksperimentoj estu daŭrigataj, kompreneble en multe pli da lernejoj.

Kontraŭ rasismo en edukado

Ĉefaj juraj dokumentoj kontraŭ rasismo kaj rasa diskriminacio en edukado. (Okaze de la «Kontraŭrasisma Jardeko» de UN kaj Unesko)
Prelego de Ivo Lapenna en la IX ILEI-konferenco en Krogerup, Humlebæk, la 24-an de julio 1975.

I

Ke ILEI kunlaboras kun Unesko okaze de la «Kontraŭrasisma Jardeko» estas ĝojige. Ĝuste la ĝeinstruistoj povas tre funde kontribui al kontraŭbatalado de rasismo, kiu estas ankoraŭ tre aktuala afero en la mondo. Tuj enkonduke mi deziras diri, ke kiam ni parolas pri rasismo, ni ĉiam devas havi antaŭ niaj okuloj ne nur rasismon de blankaj homoj kontraŭ alikoloraj homoj, sed ankaŭ rasismon de alikoloraj homoj rilate la blankajn homojn. Ĉar ekzistas multaj fenomenoj de rasismo kaj rasa diskriminacio en ŝtatoj, kiuj liberigis elsub kolonia jugo en la lastaj jardekoj, kaj en kiuj oni praktikis rasan diskriminacion rilate la blankajn aŭ alikolorajn homojn. Estas kvazaŭ iaspeca historia venĝo pro la rasismo, kium praktikis la blankuloj en la rilato al la alikoloraj personoj.

Mi ankaŭ deziras diri al vi, ke siatempe la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj akceptis rezolucion, laŭ kiu oni invitis ĉiujn registarajn kaj ĉiujn neregiŝtarajn organizaĵojn — inter aliaj ankaŭ Universalan Esperanto-Asociacion — partopreni en jardeko, kiu estos dediĉita plene la kontraŭbatalado de rasismo. Tiu rezolucio estis akceptita en la jaro 1972 en novembro; kaj poste en novembro 1973 ĝi estis detaligita. La titolo de tiu tuta dokumentaro estas: «Jardeko de aktivado por kontraŭbatali rasismon kaj rasan diskriminacion». Ni nomu ĝin simple «Kontraŭrasisma Jardeko».

UEA faris projekton de laborplano, laŭ kiu la neŭtrala Esperanto-movado devus agi, unuflanke, por helpi al Unuiĝintaj Nacioj kaj al Unesko en iliaj planoj kontraŭbatali rasismon, kaj, aliflanke, por aparte atentigi pri la lingva diskriminacio, kiel ni kutime faris.

Distinge de la bazaj laborplanoj (estis nur du: unu akceptita en 1955, la alia en 1962) ekzistis tuta aro da okazaj laborplanoj, ekzemple okaze de la jaro de homaj rajtoj, okaze de la jaro de internacia kunlaboro aŭ la jaro por kontraŭbatali la analfabetismon k.t.p..

La Okazaj Laborplanoj estis ĉiam dediĉitaj al difinita evento, kaj necese daŭris mallonge, kutime unu jaron: jaro de homaj rajtoj, jaro de internacia kunlaboro k.t.p.. En tiuj Okazaj Laborplanoj UEA ĉiam akcentis du flankojn. Unu el ili estis helpi al Unuiĝintaj Nacioj aŭ Unesko, depende de tiu organizaĵo, kiu lanĉis la laborplanon; la alia, atentigi pri la lingva diskriminacio aŭ aliaj aspektoj de la lingva demando en la mondo.

Same tiel la Laborplano por Kontraŭrasisma Jardeko enhavas tiujn du flankojn. Ĝi estis publikigita en la maja numero de la revuo Esperanto, post kiam la tiama estraro de UEA akceptis ĝin unuanime. Poste ĝi estis prezentita al la Komitato en Hamburgo. La Komitato akceptis ĝin, sed laŭ mia scio oni faris absolute nenion ĝis nun por realigi la agadojn laŭ la Laborplano.

Unue en la laborplano estas enkonduko, en kiu estas prezentitaj la ĉefaj celoj de la Kontraŭrasisma Jardeko. Tiam sekvas punkto 2: la agadoj. Tie la unua punkto estas: bazaj difinoj. Kiam ajn oni entreprenas iun paŝon en monda kadro, necese oni devas havi tiajn bazajn difinojn. Oni ne povas agi abstrakte, sen havi konkretajn difinojn, kiuj estas uzataj en la koncerna agado.

En la koncerna dokumentaro de Unesko ni havas, ekzemple, la difinojn pri raso, nacio, etna grupo, ĝia identeco kaj rasismo, digno kaj rasismo, digno kaj personeco. La plej grava el ĉiuj estas la esprimo: rasa diskriminacio. Nome, kio estas rasa diskriminacio? Ĝi estas laŭ la «konvencio pri elimino de ĉiuj formoj de rasa diskriminacio» jeno: *Kiu ajn distingo, ekskludo, limigo aŭ prefero bazita sur raso, koloro, lingvo (!) deveno aŭ nacia aŭ etna origino, kun la celo aŭ finrezulto detruji aŭ endanĝerigi la rekonon, ĝuadon aŭ praktikadon, en egaleco, de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj en la politika, ekonomia, socia aŭ kultura sferoj aŭ en kiu ajn alia sfero de publika vivo.*

Kompreneble ĝi estas iom longa difino kaj malfacile memorebla, ĉar ĉi tie enestas tuta aro da gravaj elementoj, kiuj konsistigas la difinon. Ekzemple, Distingo: distingado de unu grupo disde alia homa grupo.

Ekskludo: ekskludi iun homan grupon de iu rajto.

Limigo: limigi la rajton de iu homa grupo.

Prefero: doni preferon al unu grupo kaj ne doni la saman preferon al alia grupo.

Do, en tiu ĉi «distingo, ekskludo, limigo aŭ prefero» - se ĝi estas bazita sur raso, koloro, lingvo, deveno aŭ nacia aŭ etna origino - ni havas ankaŭ la elementon de *lingvo* (cetere tiuj ĉi difinoj ŝuldiĝas sufiĉe multe al la agadoj de UEA en Unesko, kaj al partopreno de ĝia reprezentanto en diversaj simpozioj kaj grupoj, kiujn organizis la neregistaraj organizaĵoj, ĉar ni ĉiam insistis, ke enestu la elemento: lingvo). La fakto, ke en tiuj difinoj enestas la elemento lingvo, donas al la Esperanto-movado saltobregon por entrepreni vastajn agadojn ĝuste surbaze de la lingva diskriminacio.

Sekvas la apogo al UN kaj Unesko, kiun UEA devus doni. Kaj tio devus esti farita en formo de diskonigo de la celoj de la Jardeko, de partoj de la programo kaj de aliaj materialoj en la Esperanto-gazetaro, de radio-elsendoj en Esperanto, de bultenoj, lekcioj en la Internacia Somera Universitato, prelegoj kaj de aliaj metodoj. Ekzemple mia hodiaŭa prelego ĉi tie estas tute malgranda kontribuo al la Kontraŭrasisma Jardeko, farita interkonsente kun la estraro de ILEI. Poste, partopreno de niaj organizaĵoj en seminarioj, rondtablaj konferencoj, simpozioj kaj en aliaj renkontiĝoj sub aŭspicio de Unesko aŭ de Unuiĝintaj Nacioj en ligo kun la Jardeko.

Estas plia kontribuo, kiun ni povas doni: instigoj direktitaj al la registaroj aliĝi, ratifi kaj vere realigi la principojn de la «konvencio pri elimino de ĉiuj formoj de rasa diskriminacio» kaj de aliaj konvencioj en la sfero de homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj.

Sekvas ero pri kontribuo, ĉu rekte, ĉu pere de ILEI, al formala aŭ neformala instruado de gejunuloj kaj infanoj pri la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, kaj edukado al observado de tiuj rajtoj kaj liberecoj.

Ni, kiuj instruas en la universitatoj, en mezgradaj lernejoj kaj elementaj, havas ĉiam vastajn eblecojn progresigi la scion pri la homaj rajtoj, antaŭenigi rasan egalecon per prelegoj, per seminarioj, per atentigo pri artikoloj k.t.p.. Mi mem kvankam mia ĉefa temo hodiaŭ en la universitato de Londono estas *Soveta kaj orient-eŭropa juro* - tamen en ĉiuj miaj prelegoj, seminarioj kaj kolokvoj utiligas la okazon por atentigi jen pri unu aspekto jen pri alia aspekto de rasa diskriminacio.

Do, ĉiu povas, se iomete informita pri la aferoj, kontribui al la Kontraŭrasisma Jardeko.

Aldone, oni devus organizi, ĉu memstare, ĉu en kunlaboro kun aliaj neregistaraj organizaĵoj, seminariojn kaj konferencojn rilatantajn al la celoj de la Jardeko sur laka, landa, regiona kaj internacia niveloj. Do, tuta aro da agadoj, per kiuj ni povas kontribui - konforme al la celoj de la statuto de nia organizaĵo monda - al la Jardeko de Unuiĝintaj Nacioj kaj de Unesko.

Sekvas la punkto, kiu aparte interesas nin, nome: lingvo kaj rasismo. En la Laborplano estas dirite:

Konvinkita, ke foresto de komunikado inter rasaj, naciaj kaj etnaj komunaj aŭ grupoj pro la lingvaj baroj prezentas la ĉefajn obstaklojn al reciproka kompreniĝo, kio samtempe estas unu el la bazaj kaŭzoj de rasaj antaŭjuĝoj kaj rasa diskriminacio, UEA dediĉas apartan atenton al la rilatoj inter lingvo kaj rasismo en ĉiuj ĝiaj aspektoj, sed unuavice al la du fundamentaj aspektoj, nome unue: lingva diverseco kiel unu el la fontoj de rasismo, kaj due: formoj de lingva diskriminacio kiel parto de diskriminacio ĝenerale, precipe de kultura diskriminacio. Mi emfazas tion ĉi, ĉar ĝi estas sufiĉe grava.

Ĉiu el vi, kiu vivis en komunaj multlingvaj, precipe de enmigrintoj - tute speciale, se tiuj enmigrintoj havas alian haŭtkoloron ol la loĝantaro de la koncerna distrikto scias, ke okazas amaso da miskomprenoj kaj tial da tensioj tutsimple pro la malebleco komunikadi.

Ĉar estas granda eraro kredi, ke ekzemple ĉiuj tiuj membroj de la lingvaj komunaj aŭ el Pakistano aŭ el Hindio aŭ el aliaj landoj troviĝas izolitaj, ĉar ili havas alian haŭtkoloron; ke tiuj steĉitecoj, kiuj ekzistas hodiaŭ en Britio kaj en aliaj landoj estas kaŭzitaj nur de la diferenco de haŭtkoloro. Tio estas fakte la plej malgrava. Kio ĝenas? Ĝenas, ke ili ne povas interkompreniĝi, kaj ĉar ili ne povas interkompreniĝi, ili havas la inklinon resti en sia propra lingva komunaj, kaj ne havas kontakton kun la medio, en kiu ili vivas.

Ĉar la homoj apartenantaj al diversaj lingvoj ne povas interkompreniĝi, ili havas la inklinon resti en sia propra komunaj, kaj ili ne havas kontakton kun la medio, en kiu ili vivas. Tio rilatas ankaŭ al la gastlaboristoj. Kvankam oni faris multajn kursojn por la gastlaboristoj en la landoj, en kiuj ili troviĝas, tamen la rezulto estas minimuma, kaj sekve hindoj restas kune kun hindoj, edziĝas kun hindinoj k.t.p., ili restas fermitaj en si mem, kvankam ili vivas en alia medio. Kaj tio kun la tempo kreas tensiojn. Kompreneble al tio aldoniĝas malsameco de kulturaj niveloj, malsamenco de civilizacio, kio - ĉio - kontribuas al streĉitecoj.

Unu el la bazaj kaŭzoj estas la lingva diverseco. Pro tio estus necese fari tutan aron da prelegoj en universitatoj, en lernejoj ĉie, en kiu oni prezentus kun faktoj, kun ciferoj, kun statistikoj la lingvo-diversecon, kiel unu el la ĉefaj kaŭzoj de rasa diskriminacio kaj rasa distingado, kontraŭe al la konvencio pri rasa kaj etna egaleco.

La dua aspekto estas: formoj de lingva diskriminacio kiel parto de diskriminacio ĝenerale.

Vi vidis iom poste, ke, aldone al la Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj ekzistas 16 paktoj kaj konvencioj sur la kampo de homaj rajtoj. Tiuj ĉi paktoj kaj konvencioj parolas pri la lingva egaleco kaj celas eviti lingvan diskriminacion. Ĉiuj ĉi paktoj, komencante kun la Universala Deklaracio, deklaras ekzemple, ke *la infanoj rajtas ricevi instruadon en sia gepatra lingvo; ke antaŭ la kortumoj ĉiuj rajtas uzi sian lingvon; ke, se oni ne komprenas la lingvon de la kortumo, oni devas prizorgi, ke la koncerna akuzito aŭ la partioj havu ĉiujn faciligojn por povi ricevi ĝin*. Sed lingva diskriminacio, kontraŭe al la ĵus prezentitaj principoj, ekzistas praktike ĉie. Kaj kontraŭbatali tiun lingvan diskriminacion parte estas eble, ĉar parte lingva diskriminacio estas rezulto de diskriminacia politiko de la registaro. Sed parte estas maleble, ĉar ankoraŭ oni ne akceptis la instrumenton de internacia komunikado pere de la internacia lingvo Esperanto, neŭtrale homa.

Do, tio estas nia starpunkto, kaj tiun starpunkton ni povas kaj akcenti kaj daŭre evoluigadi.

Por kontraŭbatali rasismen en tiuj du ĉefaj aspektoj, la plano antaŭvidis esplorojn, studojn kaj enketojn entreprenotajn de CED (la Centra de Esploro kaj Dokumentado) pri lingvo kaj rasismo - laŭ la supra difino - sur internacia, regiona, landa kaj loka niveloj, publikigon de la rezultoj en dokumentoj de CED kaj en la periodaĵo *La Monda Lingvo-Problemo* kaj en aliaj periodaĵoj.

Sed CED bedaŭrinde ne funkcias nun. Ekde Hamburgo ĝi eldonis eĉ ne unu dokumenton, ekde Hamburgo ne aperis unu sola numero de *La Monda Lingvo-Problemo*, kaj mi ne scias, ĉu iu ajn studas tiujn aspektojn de lingva diskriminacio en ligo kun niaj celoj.

Plue, la plano antaŭvidis studojn kaj enketojn aparte pri la multflankaj problemoj, kiujn frontas gastlaboristoj en diversaj landoj pro lingvaj baroj. Por ni esperantistoj tio ne estus tiel malfacila tasko. Ĉar multaj el ni vivas en landoj, en kiuj troviĝas multaj gastlaboristoj, kaj multaj el ni - niaj lokaj grupoj - povus fari facile kontakton kun la gastlaboristoj. Do, oni povus facile studi la problemojn, kiujn frontas la gastlaboristoj pro la lingva diverseco kaj, rezulte, helpi al ili.

La plano mencias ankaŭ studojn entreprenotajn de la internaciaj Esperanto-organizaĵoj de juristoj kaj edukistoj pri la juraj kaj edukaj aspektoj de la rilato inter lingvo kaj rasismo.

Plue, konferencoj kaj seminarioj pri lingvo kaj rasismo organizotaj ĉu rekte de UEA, ĉu de ĝia junulara sekcio, ĉu de la landaj, lokaj aŭ fakaj Esperanto-organizaĵoj. Komprenoble, se oni organizas ion tian, oni devas anticipi plani la koncernan aranĝon kaj doni sufiĉe da tempo kaj sufiĉe da energio por sukcesigi ĝin.

Plue: specialaj kunvenoj kaj debatoj, skribaj aŭ oratoraj konkursoj, prelegoj en Somera Universitato kaj kunsidoj de fakaj asocioj, ĉio-ĉi organizota laŭbezo-

ne en la kadroj de universalaj kongresoj de Esperanto, internaciaj junularkonferencoj de TEJO, internaciaj kongresoj de fakaj organizaĵoj, landaj Esperanto-kongresoj k.t.p.

Sekvas la intencigo de agadoj okaze de la Semajno de Amikeco, kiun organizas UEA ĉiujare en februaro.

Estas alia grava punkto: kursoj de internacia lingvo organizotaj de la koncernaj landaj aŭ lokaj organizaĵoj en la medioj de lingvaj minoritatoj, ekzemple de gastlaboristoj kaj enmigrintoj, kun la celo ebligi komunikadon kun alilingvanoj, forigi antaŭjuĝon kaj tensiojn, faciligi integriĝon sen perdo de la propra nacia aŭ etna identeco.

Tio eble ŝajnas al vi el la nuna perspektivo kiel tro aŭdaca programo, sed ĝi ne estis aŭdaca. Tion ĉi oni povus realigi, komprenoble surbaze de unuecaj agadoj, surbaze de bona volo kaj multe da sindono - kaj mi plu fidus, ke la esperantistaro havas bonan volon kaj sindonon - nur oni devas iom organizi la agadon, por ke estu sukceso.

Kiel ĉiuj okazaj laborplanoj, ankaŭ tiu ĉi havas ĉe la fino la atingotajn, minimumajn kaj la maksimumajn celojn.

Ĉi tie mi aparte atentigas pri la punkto 2 de tiu konkluda parto, nome: antaŭenigi la respekton por la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, firmigante tiamaniere ankaŭ la kondiĉojn, kiujn UEA rigardas kiel esencajn por sukcesaj laboroj.

Ĝi rilatas la artikolo 4, alineo 2, de la Statuto de UEA, kiu eniris en la Statuton en la jaro 1947 dum la Universala Kongreso en Bern. Tiam ni en la Komitato decidis unuanime, se mi bone memoras, ke la ero pri la Homaj Rajtoj eniru en artikolon 4 de la Statuto. Ĝi estis farita en tiu formo, ke UEA deklaras, ke la respekto de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj estas antaŭkondiĉo por sukcesa laboro por Esperanto. Mi estas absolute konvinkita, ke tiel estas.

La tuta historio de la Esperanto-movado montras, ke nur ne kondiĉoj de politikaj reĝimoj, kiuj respektas la fundamentajn liberecojn de la homo, kaj la fundamentajn liberecojn de la homo, kaj la fundamentajn rajtojn de la homo, rajtojn kaj liberecojn per kiuj la homaro luktis ekde kiam la homo konsciigis pri sia homeco, estas absolute esenca antaŭkondiĉo por la disvastigo de la Internacia Lingvo, kiu siavice helpas ankaŭ al firmigo de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj.

Se vi ĵetas rigardon al la historio de Esperanto ekde kiam Zamenhof en la jaro 1887 donis ĝin grandanime al la homaro, vi vidas, ke en ĉiuj diktatorecaj reĝimoj Esperanto estis persekutata, la Esperanto-organizaĵoj estis disigataj. Tio okazis jam en cara Ruslando, kiel okazis poste sub naziismo en Germanio, sub faŝismo en aliaj landoj, sub komunismo de Stalin. En la verko *Esperanto en Perspektivo* estas prezentitaj ĉiuj persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo.

En dokumento, kiun mi verkis antaŭ delonge, «Hamburgo en Retrospektivo» estas prezentita ankaŭ la kaŭzo, kial ĝuste Esperanto devis esti viktimo de tiuj persekutoj. Kial ne la angla, kial ne la franca, kial ne kiu ajn nacia lingvo morta aŭ vivanta estis kiam ajn viktimo, sed jes Esperanto?

Estas tiel, ĉar unue la facileco de Esperanto ebligas eĉ al ordinarij homoj sen granda edukiteco eklerni tiun lingvon, ekmajstri ĝin kaj kontakti kun alilandanoj,

kio glitas el sub la kontrolo de la policaj aŭtoritatoj en tiuj policaj ŝtatoj. Tio estas unu kaŭzo. La dua estas, ke esence, laŭ sia tuta idearo, kiun Zamenhof ligis al la Internacia Lingvo, kaj kiun la vastaj tavoloj de la esperantistaro ĉiam akceptis kiel ĝustan, Esperanto estas rimedo de komunikado por ĉiuj, sen iu ajn distingo de raso, nacia aparteno, religia aparteno, socia aparteno aŭ kiu ajn alia aparteno.

Esperanto ne estas monopolo de unusola politika ideologio, sed ĝi estas instrumento de komunikado por ĉiuj homoj de bona volo, kiuj fidus kaj kredas je la eblecoj de interpopola frateco kaj pli bona interpopola interkompreniĝo. Tiel ni esperantistoj agis ĉiam ekde la komenco. Kaj ĉar Esperanto havas tiun idean flankon - mi intence ne nomas ĝin ideologan flankon - tial ĝi estis persekutata; fakte ĝi peras tiun solidarecon internacian, pri kiu revis la plej noblaj kaj altaj spiritoj de la homaro.

Nu, tial por mi la respekto de la homaj rajtoj estas esence grava. Mi pritraktis iom pli longe tiun ĉi aspekton, ĉar antaŭ nelonge mi legis en unu el la Esperanto-periodaĵoj, ke UEA devus ne enmiksiĝi en la aferon de homaj rajtoj. UEA, la neŭtrala movado, *devas* enmiksiĝi en la aferojn de homaj rajtoj, ĉar la afero de homaj rajtoj estas afero de ni ĉiuj, de vi, de mi, de ĉiuj, kiuj ne estas ĉi tie, de ĉiuj ordinarnaj homoj.

Krom tio la afero de homaj rajtoj ne plu estas nur politika afero; ĝi estas grava socia demando, kiu estas ligita ankaŭ al disvastigado de Esperanto, ĉar ni ne povas disvastigi la lingvon, se ne ekzistas respekto al la homaj rajtoj. Tial, luktante por la homaj rajtoj, kontraŭ la rasa diskriminacio en la kadro de la Kontraŭ-rasisma Jardeko, signifas samtempe helpi al disvastiĝo de Esperanto.

III

Mi diris en la komenco, ke ekzistas diversaj konvencioj.

La unua plej grava dokumento sur la kampo de la homaj rajtoj estas la Universala Deklaracio de la 10-a de dec. 1948. Pri la Universala Deklaracio ni sufiĉe multe parolis; mi mem faris prelegojn en diversaj seminarioj, en Somera Universitato, skribis artikolojn, eĉ en la libro *Aktualaj problemoj de nuntempa internacia vivo* troviĝas tuta granda ĉapitro pri la origino de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj. Tie mi diris, ke ĝi estis imagita kiel ia nura deklaro de rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, kaj estis en tiu tempo - en 1948 - antaŭvidite, ke poste estas faritaj pluraj paktoj por detaligi la principojn entenatajn en la Universala Deklaracio. Tiuj paktoj estis fariĝontaj devigaj por la ŝtatoj.

Mi citos rapide la ĉefajn dokumentojn. Do, estis unue la Universala Deklaracio; poste estas la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, kiu havas en pluraj artikoloj mencion pri la homaj rajtoj. Unu estas la konvencio pri la prevento de la krimo de genocido. Genocido estas krimo, kiu rilatas la ekstermo de tuta etna grupo per diversaj metodoj, ĉu fizika ekstermo, kiel faris Hitler kaj kelkaj aliaj diktatoroj, ĉu alispeca ekstermo, ekzemple per senigo de tiu etna grupo de ĝiaj kulturaj valoroj, de ĝiaj bibliotekoj, de ĝiaj libroj kaj similaj aferoj, do senigo de ĝia identeco. Tiu konvencio fariĝis valida, ĝin subskribis preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de la mondo kaj ratifis ĝin. Multaj eroj de tiu konvencio eniris en la kriminalajn kodojn de diversaj landoj, kio ne signifas, ke oni observas tion.

La dua estas la Konvencio pri la subpremo de komerco per personoj kaj eks-

pluatado de prostitucio, kiun oni akceptis en 1949. Ĝi estis direktita, fakte, kontraŭ tio, kion oni nomas komerco per blankaj sklavoj, fakte sklavinoj.

Sekvas la konvencio, kiu rilatas al la statuso de rifuĝintoj de la jaro 1951.

La kvara estas la Konvencio pri la internacia rajto je korekto. Kiel vi scias, en la gazetaro de la mondo, inkluzive la Esperantan, aperas amaso da mensogoj, kalumnioj. Homoj ofte estas viktimoj de tiaj kalumniaj agoj. Kaj la homo ofte estas senpova, ĉar se oni sendas korektojn, tiuj korektoj ne aperas.

Sekve disfamiĝas io, kio estas absolute malĝusta. Tial oni akceptis konvencion en la jaro 1952 pri la internacia rajto je korekto: sendi korekton al la gazeto kaj havi rajton, ke tiu korekto aperu.

La 5-a estas la konvencio, kiu rilatas al politikaj rajtoj de la virinoj (1952). Kiel vi scias, nun estas la virina jaro, kaj oni faras ion sur tiu kampo.

La 6-a konvencio estas tiu de 1926 kontraŭ sklaveco, sed kiu poste estis renovigita en la jaro 1953 kaj kompletigita per aliaj eroj.

La 7-a estas la konvencio, kiu rilatas al la statuso de senŝtatanecaj personoj.

La 8-a estas aldona konvencio pri nuligo, pri abolo de la sklaveco, de komerco per sklavoj kaj de similaj praktikoj. Je via surprizo, eble, multe da sklaveco ankoraŭ ekzistas en la mondo en la vera senco de la vorto: oni vendas kaj aĉetas homojn.

La sekvanta, la 9-a konvencio, rilatas al la ŝtataneco de la edziniĝintaj virinoj.

La 10-a estas la konvencio pri redukto de senŝtataneco.

La 11-a konvencio rilatas al konsento je geedziĝo, minimuma aĝo por geedziĝo, kaj la rajto de la estontaj geedzoj elekti unu la alian kiel geedzojn.

La 12-a konvencio rilatas al elimino de ĉiuj formoj de rasa diskriminacio. Ĝi estas unu el la plej gravaj konvencioj, kiuj aperis en plej diversaj lingvoj, ĝi ankoraŭ ne aperis en Internacia Lingvo. (La Universala Deklaracio aperis, la ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj kelkaj aliaj dokumentoj same, sed tiu ne).

La 13-a konvencio estas la pakto pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj de la jaro 1966, dum la 14-a estas la pakto pri civitanaj kaj politikaj rajtoj de la jaro 1966.

La 15-a estas la t.n. Libervola Protokolo, aldone al la Pakto pri Civitanaj kaj Politikaj Rajtoj, kaj fine la 16-a, la protokolo, kiu rilatas al la statuso de rifuĝintoj.

Do, 16 konvencioj. El tiuj nur kelkaj estis ratifitaj. Tiu pri genocido fariĝis valida post tre mallonga tempo, ĉar ĉiuj ŝtatoj ratifis ĝin. Kaj la aliaj estas pendantaj. Tial, se vi memoras, mi diris antaŭ kelkaj minutoj, ke unu el la klopodoj, kiujn ni povus fari, estas insisti ĉe ĉiuj registaroj per rezulucioj, per premoj alispecaj kaj artikoloj en la gazetoj, ke ili ratifu la koncernajn konvenciojn. Tiuj konvencioj estis akceptitaj en la lastaj jardekoj post la Universala Deklaracio por Homaj Rajtoj. Ili estas divideblaj en du grandajn grupojn. Al la unua kategorio apartenas la konvencioj pri apartaj rajtoj kaj liberecoj, ekzemple la konvencio kontraŭ genocido de 1948, aŭ la konvencioj kontraŭ senŝtataneco de 51 kaj 54, kontraŭ sklaveco de 1956, kontraŭ deviga laboro de 1957 k.t.p.. Mi ne citos al vi ĉiujn ĉi konvenciojn, sed nur volas montri al vi, ke unu speco de tiuj konvencioj rilatas al unuopaj rajtoj kaj liberecoj.

Alia grupo estas la ĝeneralaj konvencioj. Tie estas 3 eksterordinare gravaj tra-

ktatoj, kies celo estas, kiel mi diris, ĝenerala. Temas unuavice pri la du paktoj por la apliko de la Universala Deklaracio. Unu el ili koncernas la ekonomian, socialan kaj kulturalan rajtojn de la homoj. La alia rilatas al la civitanaj kaj la politikaj rajtoj. Ambaŭ estis akceptitaj de la Ĝenerala Asembleo la saman tagon, nome la 16-an de dec. 1966, kaj prezentas la rezulton de 18-jara intensa laboro. La 3-a pakto estas la Fakultativa Protokolo, do libervola protokolo al la Internacia Pakto de civitanaj kaj politikaj rajtoj.

La Internacia Pakto de civitanaj kaj politikaj rajtoj konsistas el 53 artikoloj, kaj ĝi rilatas ĉefe al la rekonitaj rajtoj kaj liberecoj entenataj en la Universala Deklaracio.

Parte ĝi ripetas la rajtojn kaj la liberecojn laŭ la Deklaracio, parte ĝi precizigas ilin. En pluraj artikoloj la pakto i.a. enhavas regulojn pri la lingvaj rajtoj, ekzemple artikolo 2 preskribas, ke la ŝtataj partioj devigos sin certigi al ĉiuj individuoj sur siaj respektivaj teritorioj ĉiujn rajtojn rekonitajn en la pakto senkonsidere al ilia lingva aparteno.

Artikolo 4 eksplicite malpermesas lingvan diskriminacion. Artikolo 14 preskribas, ke akuzito devas tuj esti detale informita pri la uzo en lingvo, kingvo, kiun li komprenas, kaj ke li rajtas havi senpagan helpon de interpretisto, se li ne parolas la lingvon uzatan de la kortumo k.t.p. k.t.p.. Tuta aro da rajtoj, kiuj estas ligitaj al la lingvo.

La dua pakto, tiu pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, konsistas el 31 artikoloj, ĝi rilatas ĉefe al la rajtoj kaj liberecoj entenataj en la dua parto de la Universala Deklaracio. Tio estas la modernaj rajtoj, ekonomiaj rajtoj, sociaj rajtoj, rajtoj ekzemple havi laboron, rajton havi kompenson en okazo de senlaboreco, kaj similaj rajtoj. Tiu ĉi pakto havas plurajn preskribojn, kiuj estas preskaŭ identaj al la preskriboj de la pakto de civitanaj kaj politikaj rajtoj, ekzemple koncerne la rajtojn de ĉiu popolo decidi mem pri sia sorto. Oni ne aplikas tion. En alia parto la pakto difinas la rajton je laboro, je organiziĝo en sindikatoj, je striko, socia sekureco, protekto de familio, adekvata vivnivelo, edukado, partoprenado en la kultura vivo kaj ĝuado de ĉiuj atingoj de la scienco. Ankaŭ tiu parto garantias lingvan egalecon en sufiĉe multaj artikoloj.

Post la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj oni longe diskutis, ĉu havi unu, kiel mi diris, pri civitanaj kaj politikaj rajtoj kaj la alian pri sociaj kaj ekonomiaj rajtoj. Kaj oni decidis krei du paktojn, ĉar oni kredis, ke kelkaj ŝtatoj estas maturaj akcepti unu pakton, ekzemple tiun de politikaj rajtoj, sed ne estas maturaj akcepti la alian pakton, ĉar ili ne esta sufiĉe evoluintaj. Do, oni havas du paktojn.

Nu, tiuj paktoj estis akceptitaj preskaŭ unuanime; ĉiuj ŝtatoj, kiuj ĉeestis en 1966 voĉdonis por la du paktoj, sed poste ili bedaŭrinde hezitis ratifi. Por vi, kiuj ne estas juristoj, kaj tial ne komprenas tiun proceduron en interacia juro, mi diru nur kelkajn vortojn pri tiaj kolektivaj, internaciaj traktatoj, kiuj povas esti nomataj konvencioj, paktoj, kontraktoj, traktatoj k.t.p., ne gravas la nomo.

Okazas konferenco de delegitoj de la ŝtatoj por pridiskuti projekton de ia konvencio. Oni diskutas ĝin, oni faras amendojn, kaj denove diskutas kaj amendas amendojn k.t.p.. Fine oni voĉdonas, kaj oni akceptas ĝin. Tiel la du paktoj estas akceptitaj.

Tiam la tuta afero iras al la parlamentoj aŭ al aliaj organoj, kiuj rajtas ratifi la koncernajn internaciajn konvenciojn. Kaj tie okazas la granda halto. Ofte la ŝtatoj, kiuj subskribis la koncernan konvencion aŭ pakto, poste tamen ne volas ratifi. Tiamaniere okazis, ke la du paktoj ankoraŭ ne ekvalidas, ĉar ne venis sufiĉe granda nombro da ratifaj instrumentoj. Ratifa instrumento estas dokumento, per kiu unu ŝtato informas la instancon, ĉe kiu oni deponas tiujn ratifajn instrumentojn, ke ĝi ratifis la koncernan konvencion laŭ la juro de sia propra lando.

Kiel mi diris, bedaŭrinde tiuj du paktoj, kiuj estas tiel gravaj, kaj la Fakultativa protokolo, kiu estas eĉ pli grava, ne ekvalidis.

Kial mi diris, ke la Fakultativa protokolo estas eĉ pli grava?

Ĉar la Fakultativa protokolo (siaspeca pakto), kiu estas aldonita al la pakto de la politikaj rajtoj, donas fine en mondaj kadroj al la individuo la rajton plendi antaŭ internacia instanco kontraŭ sia propra registaro.

La Eŭropa Konvencio, pri kiu mi ne parolas hodiaŭ, estas multe pli progresinta tiurilate ol la tuta instrumentaro de Unuiĝintaj Nacioj sur tiu kampo. La Eŭropa Konvencio jam delonge ebligis al individuo plendi antaŭ internacia instanco, antaŭ Internacia Kortumo, por fina decido pri la neobservado de homaj rajtoj rilate la koncernan individuon.

Sed en mondaj kadroj tiun rajton devus doni la Fakultativa protokolo, sed, ĉar nek la paktoj nek la Fakultativa protokololo jure ekvalidis, ni kiel individuoj restas sufiĉe senpovaj. Tial estas en nia intereso de individuoj, ke ni premu je niaj registaroj en diversaj formoj. Mi ripetas: oni povas fari tion per rezolucioj, per artikoloj, per edukado de la infanoj, per prelegoj en universitatoj kaj lernejoj: premi ĉi ĉiujn registarojn de niaj propraj landoj, ke ili ratifu la du paktojn kaj la Fakultativan protokolon, tiel ke ili ekvalidu.

Tio ĉi, karaj geamikoj, estas ĉio, kion mi volis al vi diri pri la homaj rajtoj kaj pri tiuj diversaj konvencioj, 16, mi ripetas, kiuj estis akceptitaj de la ŝtatoj en la kadro de Unuiĝintaj Nacioj, ĉefe surbaze de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj. Mi esperas, ke tiu ĉi eta kontribuo al via seminario, al via konferenco ĉi tie, helpos vin pli bone kompreni la gravecon de la homaj rajtoj kaj de fundamentaj liberecoj, la gravecon de la 16 konvencioj, kiuj hodiaŭ ekzistas por protekto de tiuj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Vi ĉiuj, kaj kiel organizaĵo kaj kiel unuopuloj, edukistoj, instruistoj en viaj lernejoj, verŝajne faros vian eblon por diskonigi la Kontraŭrasisman Jardekon, por diskonigi la konvenciojn kaj precipe por paroli al la infanoj, al la gejunuloj pri la lingva diskriminacio, pri la Internacia Lingvo kiel unu el la instrumentoj por kontraŭbatali rasismon kaj rasan diskriminacion.

La ideo de interŝtata konvencio pri enkonduko de Esperanto en lernejojn: klopodoj en la pasinteco - eblecoj en la nuntempo

Prelego de prof. d-ro Ivo Lapenna en la IX ILEI-konferenco en Krogerup, Humlebæk, la 22-an de julio 1975.

(Teksto koncizigita de la preleginto laŭ la surbendigita parolado).

Estimata prezidanto, karaj geamikoj!

Kiel s-ro Sonnabend ĵus diris al vi, hodiaŭ ni pritraktos la interŝtatan konvencion pri enkonduko de Esperanto en lernejojn: la spertojn de la pasinteco kaj la perspektivojn por la estonteco.

Dum mi verkadis kaj redaktadis en la lastaj 3 jaroj la verkon «*Esperanto en Perspektivo*», mi ofte pensis kiom da laboro estis necesa por transformi projekton - kaj estis okcento da projektoj de internacia lingvo - en vivantan lingvon de vivanta internacia kolektivo. Mi tion akcentas tuj en la komenco, ĉar oni komencas, eĉ en esperantistaj medioj, spekulacii pri tio, ĉu Esperanto estus sufiĉe bona aŭ ne, ĉu alia projekto de komuna lingvo estus pli taŭga ol Esperanto aŭ ne. Oni klarigadas, ke Esperanto estas tamen pli bona ol aliaj projektoj, tute ne atentante al unu esenca elemento, nome, ke por transformi projekton de internacia lingvo en veran lingvon uzatan praktike de multaj homoj tra la mondo necesas enspiri en la projekton tiun idearon de humaneca interanciismo, kiu fariĝis esence ligita al ĝi. Mi kuraĝas al vi diri, kiel ĝisosta esperantisto, ke ankaŭ Volapük, Interlingva aŭ Interlingve aŭ Latino sineflexione aŭ kiu ajn el tiuj projektoj, teorie kaj principe estus povinta transformiĝi en vivantan lingvon, se ĝi estus havinta animon. Ili ne havis kaj ne havas ĝin. Nur Zamenhof donis al Esperanto animon, kaj ĉefe tio ebligis, ke ĝi transformiĝis en vivantan lingvon. Tio kaŭzis, ke miloj, dekmiloj da personoj sindone dediĉis ne milojn, sed milionojn da laborhoroj por transformi tiun projekton en vivantan lingvon. Milionoj da laborhoroj estis necesaj por ke tio, kio en *Esperanto en Perspektivo* sekve nomiĝas Faktoj pri la Internacia Lingvo, estu fakte faktoj pri la Internacia Lingvo! La ampleksa literaturo traduka; la originalaj verkoj kreitaj en la Internacia Lingvo; la diversaj organizaĵoj, kiujn ni formis por antaŭenigi Esperanton; la sennombraj konferencoj, renkontiĝoj, seminarioj, kongresoj ktp., ĉio ĉi postulis amason da laboro, multe da talento kaj da inteligento, kaj ebligis tion, kion ni hodiaŭ nomas la Internacia Lingvo Esperanto.

Estas grandega, nepardonebla eraro ne kompreni la grandecon de tiu transformiĝo, kaj meti tiun vivantan lingvon kun propra koro kaj kun propra animo sur la saman nivelon kiel diversajn mortnaskitajn projektojn.

Pro ke lingvo estu internacia, diris Zamenhof, ne sufiĉas nur nomi ĝin tia. Mi ripetas tiujn vortojn: pro ke lingvo estu internacia, ĝi devas esti kaj internacia kaj lingvo - lingvoprojekto ne estas lingvo, kaj ankoraŭ malpli internacia. Por ke ĝi estu internacia, ĝi devas esti internacia kaj laŭ sia strukturo kaj laŭ la kolektivo, kiu akceptis ĝin kiel sian lingvon.

I

Inter la grandegaj klopodoj vastigi la uzadon de la Internacia Lingvo la agadoj direktitaj al enkonduko de Esperanto en la lernejojn okupas gravan lokon. Ofte, plej ofte - antaŭ la Unua Mondmilito ĉiam - tiuj agadoj estis ŝuldataj al unuopaj esperantistoj: instruisto, direktoro de iu lernejo, iu lerneja inspektoro, kiu lernis la lingvon, klopodis enkonduki la lingvon en sian propran lernejon. Tiuj klopodoj ne estis internacie kunligitaj, kaj tial ili ne havis ian daŭran valoron. Neniel neante la signifon de tiuj unuaj paŝoj, estas evidente, ke nur paralela instruado de Esperanto en nombro da lernejoj de pluraj landoj povas doni vere pozitivajn rezultojn kun daŭra valoro. Baldaŭ oni ekkonsciiis pri tio, kaj la laboro post la Unua Mondmilito fariĝis internacie organizita. La unua granda klopodo okazis en la Ligo de Nacioj. En tiu tempo Universala Esperanto-Asocio, kiu havis sidejon en Ĝenevo, kaj kiu havis la feliĉon havi prof.-n Edmond Privat kiel unu el la gvidantoj, iniciatis en la ligo rezolucion, kies ĉefa celo estis enkonduki Esperanton en la lernejojn. Vi trovas en *Esperanto en Perspektivo* koncizan priskribon de la agadoj. En tiu tempo d-ro Edmond Privat estis honora jura konsilisto de la persa ĉefdelegito, Princo Arfa, kaj poste li fariĝis vicdelegito de Persio ĉe la Ligo de Nacioj. Laŭ lia iniciato 11 delegacioj prezentis al la Asembleo de la Ligo en decembro 1920 projekton de rezolucio, kies ĉefa punkto tekstis: «... esperas, ke tiu instruado de Esperanto en la lernejoj fariĝos pli ĝenerala en la tuta mondo, tiel ke la infanoj de ĉiuj landoj povus scii almenaŭ du lingvojn: sian gepatran kaj facilan rimedon por internacia komunikado; petas la Ĝeneralan Sekretarion prepari por la sekva asembleo raporton pri la rezultoj atingitaj en tiu ĉi rilato».

La rezolucio estis rifuzita de la Unua Asembleo, ĉar precipe la franca delegacio forte kontraŭstaris ĝin. En tiu tempo, oni devas scii, la franca lingvo estis ankoraŭ rigardata kiel la lingvo de diplomatio, kaj la angla nur komencis konkurenci al la franca. Ĝis la Ligo de Nacioj la franca estis la sola lingvo de diplomatio. Nur en la Ligo de Nacioj la angla kaj la franca fariĝis la du «kutimaj lingvoj». Oni eĉ ne kuraĝis nomi ilin «oficialaj». Sekve la franca delegacio rigardis Esperanton kiel danĝeran lingvon por la intereso de la franca, same kiel hodiaŭ aliaj grandaj kulturaj imperialismoj ja luktas unu kontraŭ la alia - la angla kultura imperialismo kontraŭ la franca, la franca kontraŭ la angla, ambaŭ kontraŭ la rusa, la rusa kontraŭ ambaŭ, la ĉina kontraŭ ĉiuj tri ktp. - sed ili ĉiuj unuigis, se temas pri negativa starpunkto rilate al Esperanto. Do, en tiu tempo la francoj tre akre kontraŭstaris la proponon, kaj la afero malsukcesis.

Dum la Dua Asembleo de la Ligo de Nacioj en 1921 prof. Privat denove iniciatis la aferon, kaj tiuokaze 12 ŝtatoj - Sud-Afriko, Rumanio, Persio, Belgio,

Ĉeĥoslovakio, Colombio, Ĉinio, Finnlando, Albanio, Japanio, Venezuelo kaj Hindio - faris proponon en la sama senco.

La subskribintoj samtempe petis la Prezidanton de la Asembleo, ke la Raporto de la dua komitato de la antaŭa Asembleo kaj la Raporto de d-ro Nitobe, kiu tiam estis la Ĝenerala Subsekretario de la Ligo de Nacioj, estu komunikita al ĉiuj ŝtatoj-membroj de la Ligo.

La Raporto de d-ro Nitobe rilatis al la rezultoj de lia oficiala partopreno de la 21-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Prago, Ĉeĥoslovakio, en 1921. Ĝi estis tre favora al nia afero. Tiun Raporton mi sufiĉe abunde analizis en *Esperanto en Perspektivo*.

La Dua Asembleo akceptis la pozitivajn konkludojn de la Dua Komitato kaj instrukiis la Sekretariaton entrepreni enketon por ebligi al la Tria Asembleo pritrakti la demandon de Esperanto-instruado en la lernejoj.

En la sama periodo okazis en la palaco mem de la Ligo de Nacioj laŭ iniciato de prof. Privat grava konferenco de lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata. Partoprenis reprezentantoj de komunumaj kaj lernejoj aŭtoritatoj kiel ankaŭ de edukaj asocioj el 28 landoj (kiel en Helsinko proksimume). Registaroj de 16 ŝtatoj sendis siajn oficialajn observantojn.

Tiu ĉi teknika konferenco formale kunvokita de la Instituto Jaen-Jacques Rousseau en Ĝenevo, pritraktis la tutan demandon en scienca kaj senpartia spirito. Ĝi liveris al la Sekretariato longan raporton, el kiu mi citas jenan parton: «La Ligo de Nacioj rekomendas, ke tiu ĉi instruado de la Internacia Lingvo fariĝu ĝenerala en la publikaj lernejoj de la tuta mondo, kiel praktika kaj populara rimedo por internacia rilatado, neniel celanta prejudici la epoklongan prestiĝon de la civiligitaj lingvoj».

Do - la Raporto de tiu lerneja konferenco estis sendita al Sekretario de la Ligo de Nacioj. Kune kun la Raporto de la Pariza Komerca Ĉambro, tre favora al Esperanto, kune kun la Raporto de d-ro Nitobe, ĝi formis la bazon por la diskuto en la Tria Asembleo de Ligo de Nacioj, kiu okazis en aŭtuno 1923.

La Tria Asembleo transdonis la tuton al la Kvina Komitato, kaj tiu iom amendis la Raporton de la Ĝenerala Sekretario, ellasis unu parton, sed tamen akceptis la Raporton, kiu estis tre grava, ĉar la Raporto ja estis favora al Esperanto. La teksto de la Rezolucio de la Komitato prezentita al la Asembleo, punkto 2, tekstis: «ke la demandoj rilatantaj al instruado de Esperanto estu transdonitaj al la Komisiono pri Intelekta Kunlaborado, por ke tiu Komisiono povu doni sian opinion pri la diversaj aspektoj de la problemoj de helpa internacia lingvo». La 21-an de septembro 1922 la Tria Asembleo akceptis la Konkludojn de sia Kvina Komitato kaj tiel la demando venis en la manojn de la misfama Komisiono pri Intelekta Kunlaborado.

Ne nur pro ĝiaj fantaziaj diroj pri Esperanto, sed ankaŭ pro aliaj fuŝaĵoj, mi nomis tiun Komisionon «fuŝkomisiono», kaj ĝi estis tia. Ĝi fakte entombigis la tutan aferon. Ĝi kunsidis la 31-an de julio kaj la 1-an de aŭgusto 1923. Ĉiu esperantisto, batalanta por la afero de Internacia Lingvo, devus legi la protokolon por vidi, kiajn stultajn povas diri homoj, kiuj estis membroj de Komisiono, kun la nomo «Por Intelekta Kunlaborado». Ili rifuzis la proponon per 6 voĉoj kontraŭ 1 kaj 2 sindetenoj. Ili diris en la Rezolucio - meritas ĝin legi - ke ili ne rekomen-

das al la atento de la Ligo «artefaritan lingvon», sed rekomendas la studadon de «la civiligitaj lingvoj de la grandaj nacioj».

Tiele, la grandaj fortostreĉoj de la periodo 1920-1923 malsukcesis. Tamen estis ankaŭ sukceso en tiu senco, ke multaj registaroj devis iom informiĝi pri Esperanto, kaj ke la Raporto de Nitobe plu konservas sian valoron. Mi ripetas, ke pliaj detaloj pri la agado ĉe la Ligo de Nacioj troviĝas en *Esperanto en Perspektivo*.

Menciinda estas ankaŭ alia iniciato. Jam en 1920, do samtempe kun la propono al la Unua Asembleo de la Ligo, d-ro Antoni Czubryński (Cubrinski), rimarkinte la malavantaĝojn de elpaŝoj nur en landaj aŭ lokaj kadroj, prezentis projekton de internacia agado. La fina celo estis subskribo de Interŝtata Esperanto-Akordo pri enkonduko de la lingvo en lernejojn. Pri tio aperis artikoloj en gazetoj, kaj kelkloke oni povis ion entrepreni, sed pro la foresto de kompetente organiza aparato, eĉ taŭgaj preparlaboroj por atingi tiun grandiozan celon ne povis esti faritaj. La ideo estis renovigita en 1937 okaze de la Jubilea UK en Varsovio. D-ro Czubryński verkis specialan studon pri la afero, kaj ĝi aperis en la Jarlibro de UEA por 1937. Bedaŭrinde, la tiamaj malfacilaĵoj interne de UEA kaj la eksplodo de la milito en 1939 malebligis la realigon de la plano.

Tio estis la ĉefaj klopodoj en la periodo inter la du militoj.

II

Post la Dua Mondmilito reviviĝis la Esperanto-Movado en diversaj landoj, kaj ni komencis konstruadi la modernan UEA. En 1954, dank' al bone planitaj kaj efektivigitaj agadoj sur internacia kaj landa niveloj, ni atingis la konatan Rĉzolucion de Unesko. En ĝi troviĝas ankaŭ mencio pri la instruado de Esperanto en la lernejoj. La punkto 4223 de la Rezolucio tekstas: «notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo».

La Rezolucio malfermis multajn pordojn, tra kiuj ni povis penetri, sed bedaŭrinde la Movado, precipe la landaj asocioj, ne ekspluatis ĉiujn eblecojn, kiujn ĝi prezentis. La konata afero Connor - nome la atako de la ekstrema dekstro kontraŭ la neŭtralecon de UEA - sendube influis negative. Se interne de la Movado okazas tiaj malfacilaĵoj (por uzi mildan esprimon), oni ne povas centprocente utiligi tiajn grandegajn rezultojn, kia estis la Rezolucio de 1954. El la multnombraj pozitivaj rezultoj de la Rezolucio kaj de la establitaj konsultaj rilatoj, aparte menciinda estas la agado en ligo kun la t.n. ĉefprojekto «Asociiĝintaj Lernejoj». Ni eĉ atingis, ke la Sekretariato de Unesko mem dissendis al ĉiuj Ŝtatoj-Membroj cirkuleron rekomendante, ke en la lernejoj aliĝintaj al tiu projekto oni enkonduku Esperanton. Kompreneble, UEA sendis al la Landaj Asocioj kaj al ILEI - en tiu tempo ĝi ne estis tiel forta kiel poste - klarigojn pri la tuta afero kaj instigis ilin kontakti siajn landajn aŭtoritatojn por utiligi la cirkuleron de la Sekretariato. Bedaŭrinde, ankaŭ tiu sufiĉe unika ebleco ne estis utiligita pro la malforto de la landaj asocioj kaj de la tiama ILEI.

Ankaŭ la agadoj ĉe Unesko en la periodo 1950-54 poste estas pli detale pritraktitaj en *Esperanto en Perspektivo*.

En 1959, okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof, la Komitato de UEA unuanime decidis precize la 14-an de decembro alvoki ĉiujn registarojn plej atente transtudi la eblecojn laŭgrade enkonduki la Internacian Lingvon en la lernejojn kaj universitatojn kiel devigan aŭ nedevigan lernobjekton. La decido estis farita subaze de mia propono de la 25-a de oktobro 1959, kiu entenis multajn detalojn pri la historio de la tuta afero kaj pri la irota vojo por sukcesigi la proponon.

La Komitato samtempe decidis: peti ĉiujn interesitajn registarojn, unuavice la registaron de Popola Respubliko Pollando, kiel lando en kiu naskiĝis la aŭtoro de la Internacia Lingvo, iniciati traktadojn por subskribo de Internacia Konvencio pri laŭgrada enkonduko de Esperanto en lernejojn kaj universitatojn, ĉar nur paralela instruado de la lingvo en pluraj ŝtatoj povas doni efikan rezulton; komisi ĉiujn landajn Esperanto-asociojn transdoni la decidon al siaj respektivaj registaroj; instrukcii la Estraron de UEA entrepreni la necesajn paŝojn por realigi tiun ĉi decidon en la sekvantaj jaroj.

Do, tio ne estis projekto, kiu devus esti realigita en unu aŭ du jaroj, sed estis antaŭvidite, ke ni laboros longe kaj laŭplane por efektiviĝi la ideon. Estis donitaj informoj pri tio, kion oni devus fari por ke la rezulto estu efika. Ĝi inkluzivis vastan informadon pri la ĝistiam instruado de Esperanto en la lernejoj pere de la gazetaro, pere de dukaj periodaĵoj, precipe lernejoj kaj universitataj; periodajn konferencojn de geinstruistoj; intiman kunlaboradon inter la geinstruista asocio kaj UEA; intervjuojn per radio ktp. Tuta programo de kampanjo por favorigi la publikan opinion al nia afero, respektive al nia nova agado! Samtempe estis aldona projekto de Interŝtata Konvencio. Ĝi estis sendita al ĉiuj landaj asocioj kun la peto, ke ili nomu kompetentajn kunlaborantojn, ĉiu el sia propra lando, por ke ni povu taŭge harmoniigi la kampanjon kaj, se necese, revizii la projekton de la Konvencio.

La projekto konsistis el nuraj 11 artikoloj. Artikolo 2 antaŭvidis, ke ĉiu partio enkondukos la instruadon de Esperanto en kiel eble plej multe da universitatoj kaj lernejoj, sed minimume ne unu universitato, en tri lernejojn por estontaj geinstruistoj kaj en kvindek aliajn lernejojn. La studo de Esperanto devus kapabli la studentojn kaj lernantojn korekte kaj flue uzi la lingvon lege, skribe kaj parole. En la universitatoj kaj porinstruistaj lernejoj la studo daŭrus minimume 2 jarojn kaj en aliaj lernejoj minimume 3 jarojn ktp. Estis antaŭvidite, ke post kiam minimume 5 ŝtatoj subskribos la Konvencion, ĝi ekvalidos.

Sekvis amaso da korespondado kaj daŭra informado per cirkuleroj en aparta serio «Lernejoj». Post 5 monatoj da korespondado kaj instigado nur Belgio, Brazilo, Danlando, Francio, Germanio, Jugoslavio, Kanado, Nederlando, Norvegio, Pollando, Svedio, Svislando kaj Urugvajo nomis komisionojn aŭ unuopajn komisiitojn. Kelkaj el la komisiitoj estis tre kompetentaj personoj, kiuj fakte havis rilatojn kun la edukaj aŭtoritatoj de siaj landoj. Kelkaj ne estis tre kompetentaj, sed ili tamen transprenis tiun taskon. Ĉi tie mi ne povas ne diri, ke en tiaj agadoj la kompetenteco de la persono havas unuarangan gravecon. Ne sufiĉas nur nomi personon A komisiito pri io kaj kredi, ke tiu fakto meme aŭtomate donas al li la necesajn sciojn; devas esti inverse: la persono, kiu havas la necesajn sciojn, talentojn, kapablojn kaj ligojn, estu nomita komisiito. Ofte okazas tia «inversa situa-

cio» en la Esperanto-Movado, kio estas kaŭzo de tre malbonaj sekvoj. Nu, tamen estis farita io, kaj ni daŭrigis la klopodojn ĉefe por trovi taŭgan ŝtaton, kiu iniciatus la aferon.

Antaŭ la kongreso en Harrogate (1961), kies Unua Sekcio okupiĝis nur pri lernejoj, montriĝis, ke en Pollando la afero tre bone progresas. La reprezentantino de la pola asocio informis pri grandegaj sukcesoj en tiu lando. En la cirkulero 8 de la 24-a de majo 1961 estis prezentitaj la sukcesoj laŭ ŝiaj informoj. Jen ili: unue, dum la lasta vizito de profesorino Szablowska ĉe la pola ĉefministro li esprimis sin preta disendi alvokon al diversaj registaroj, por ke ili partoprenu en la Konvencio. Due, la pola registaro subvenciiis Polan Esperanto-Asocion per tia sumo, ke ĝi ebligis al Pola Esperanto-Asocio sendi delegaciojn al Svedio, Norvegio, Danlando, Nederlando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Bulgario kaj Rumanio por priparoli kun la edukaj kaj aliaj aŭtoritatoj de la respektivaj landoj la demandon de la Interŝtata Konvencio. Trie, la kompetentaj landaj instancoj de Pollando aprobis antaŭkonvencian enkondukon de Esperanto en 50 lernejojn ekde la 1-a de septembro 1961 kiel devigan studobjekton. Jam estas nomitaj la lernejoj kaj la instruistoj posedantaj la necesajn kvalifikojn. Kvare, de la 4-a ĝis la 15-a de julio okazos en Gdańsk kurso por 50 geinstruistoj de Esperanto; la programo enhavas metodikon kaj didaktikon pri instruado de Esperanto. La kurso okazos je la kostoj de la Ministerio por Klerigo ktp. ktp.. Absolute mirinda sukceso, se la informoj estus ĝustaj, kiel oni devis supozi.

En tiu tempo, laŭ invito de la danaj edukaj instancoj, mi faris prelegvojaĝon en Danlando pri Esperanto en akompano de s-ro Sven Ziegler, kiu interpretis en la dana, kaj s-ino Birthe Zacho, kiu prizorgis la ekspozicion de Esperantaĵoj. Ni vizitis ĉirkaŭ 12 porinstruistajn seminariojn. Ĉeestis amaso da gestudentoj kaj multaj geinstruistoj. Revēninte de la rondvojaĝo mi vizitis la tiaman Ministran de Edukado kaj informis lin pri la rezultoj. Kompreneble ni parolis ankaŭ pri la Interŝtata Konvencio, kaj li tute klare diris, ke, se Pollando iniciatos la aferon, kiel mi kredis, Danlando estus preta konsideri la aliĝon al la Konvencio. Do, jam estis du ŝtatoj! Ŝajnis, ke la afero fakte komencis turniĝi.

Venis la UK de Harrogate, kaj en la kongreso estis grandega seniluziigo. Mi nun ne eniros en la detalojn. Tie montriĝis, ke s-ino Szablowska aŭ revis - kaj en siaj revoj vidis tion, kion ŝi skribis al mi - aŭ io alia okazis, sed la fakto estas, ke ĉio, pri kio ŝi raportis - tiu granda fervoro de la pola registaro, tiuj diversaj lernejoj, en kiuj oni jam enkondukis Esperanton, la preteco de la ĉefministro iniciati la Interŝtatan Konvencion - ke ĉio ĉi estis pura fantaziaĵo, ke nenio reala ekzistis. Tio estis ne nur por mi persone, sed ankaŭ por multaj aliaj sinceraj kunlaborantoj en diversaj landoj grandega ŝoko.

Malgraŭ bato de Harrogate, ni daŭrigis la laboron. Ni plu klopodis atingi, ke iu ŝtato iniciatu la aferon, ĉar tio estis esenca. La klopodoj donis neniun rezulton ĉefe tial, ĉar la unuopaj kunlaborantoj, anstataŭ kontakti siajn proprajn aŭtoritatojn kaj havigi al ni en la centro ilian starpunkton, esprimadis *siajn proprajn* pensojn pri neesencaj aspektoj, ekzemple ĉu estu 50 aŭ 25 lernejoj, ĉu 5 aŭ 7 ŝtatoj partoprenu k.s.. En tiaj kondiĉoj mi denove starigis la aferon antaŭ la Komitaton dum la dua Kopenhaga kongreso en 1962, kaj la Komitato unuanime decidis, ke la kampanjo estu daŭrigata. Observante la decidon, mi ellaboris novan agadplanon,

konforman al la situacio en tiu jaro, kaj prezentis ĝin en ampleksa dokumento publikigita en cirkulero «Lernejoj» n-ro 14. La plano antaŭvidis paralelan agadon ĉe Unesko kun du variantoj de rezolucipropono kaj ĉe la registaroj kun la celo atingi Interŝtatan Konvencion. La projekto de tiu lasta estis simila al la unua projekto de 1960, sed en pluraj variantoj rilate la nombron de lernejoj, minimuman nombron de ŝtataj partoprenantoj en la Konvencio kaj kelkaj aliaj detaloj.

Ripetiĝis la spertoj de la unua parto de la kampanjo: necesis havi kompetentajn kaj sindonajn kunlaborantojn, pretajn oferi multe da tempo por sukcesigi la planon. Bedaŭrinde ne troviĝis sufiĉe da ili, kaj ĉiuj instigoj kaj kuraĝigoj restis sen kia ajn rimarkinda rezulto. Pri tio mi informis en cirkulero «Lernejoj» 19/63 de la 25-a de oktobro 1963, per kiu fakte komenciĝis la nova granda kampanjo por la Jaro de Internacia Kunlaboro, kiu rezultigis la senprecedence amasan Proponon al Unuiĝintaj Nacioj. En la Propono plian fojon estas menciita la graveco de Esperanto-instruado en la lernejoj. Detaloj pri tiu agado troviĝas en ĉapitro 22 de *Esperanto en Perspektivo*.

La tuta kampanjo, do, daŭris precize 4 jarojn: de la fino de 1959 ĝis la fino de 1963. Detalojn - nepre studotajn, se oni iam revivigos la ideon - enhavas la 19 cirkuleroj de la serio «Lernejoj», espereble troveblaj en la arkivoj de ILEI kaj de UEA, al kiu mi transdonis fine de 1974 la tutan materialon, inkluzive la abundan korespondadon.

Paralele estis fondita la Konsulta Komisiono pri Lernejoj, kiu kontentige laboris, kiel vidiĝas el koncizaj informoj en *Esperanto en Perspektivo*. Okazis pluraj lernejoj konferencoj: en Bohinj, en Beograd, en Helsinki. Intertempe, feliĉe, ILEI konsiderinde fortikiĝis kaj atingis rimarkindajn sukcesojn, sed tio estas ekster la kadro de tiu ĉi prelĝo.

III

Kiel ni vidis, la agadoj celantaj enkonduki Esperanton en la lernejojn akompanas la Movadon ekde ĝiaj komenciĝoj. La paŝoj de unuopuloj, entreprenitaj antaŭ la Unua Mondmilito, kvankam aprecindaj, ne povis doni rezultojn kun daŭra valoro ne nur pro la foresto de internacia kunligiteco, sed ankaŭ pro la fakto ke nek la eksteraj cirkonstancoj estis sufiĉe konvenaj, nek la lingvo sufiĉe evoluinta kaj socie enradikiĝinta. La klopodo ĉe la Ligo de Nacioj, kvankam tre serioze preparita ĉefe de prof. Privat, tamen malsukcesis pro la jam prezentitaj kaŭzoj, grandparte ankaŭ tial, ĉar la agado estis tro centrigita al la Ligo mem, sen sufiĉa atento je la registaroj de la Ŝtatoj-Membroj. La proponoj de Antony Czubryński estis interesaj, sed ne prilaboritaj. Post la Dua Mondmilito mi persone partoprenis en ĉiuj laboroj sur tiu kampo ekde 1950: Peticio al UN/Unesko, Pariza Konferenco de Unesko en 1952, Konferenco de 1954 en Montevideo, Asociiĝintaj Lernejoj kaj, fine, la kampanjo de 1959-1963 por Interŝtata Konvencio.

Post ĉiuj ĉi spertoj ni diru kelkajn vortojn pri la eblecoj en la nuntempo.

Laŭ mia opinio, du grupoj da kondiĉoj devas ekzisti, por ke oni havu ŝancon realigi la ideon de interŝtata konvencio: favoraj eksteraj cirkonstancoj, unuflanke, kaj forta kaj sana situacio interne de la Esperanto-Movado, aliflanke.

Kiel persono, kiu profesie-fake multe studis kaj plu studas la internaciajn rilatojn, mi estas profunde konvinkita, ke neniam en la historio de la lingva pro-

antaŭ multaj jaroj ne surbaze de esperoj aŭ deziroj, sed rezulte de sciencaj analizoj pri la evolutendencoj. La lingva batalo inter la grandaj kaj malpli grandaj fariĝis pli akuta de jaro al jaro. Kaj ju pli granda la lukto, iu pli da oficialaj kaj laboraj lingvoj, ju pli da ĝenoj por la unuopulo pro la nuna lingva situacio, des pli maturaj la cirkonstancoj por akcepto de unusola neŭtrale homa lingvo - la sola vere internacia kaj vere lingvo: Esperanto.

Ankaŭ la publika opinio ĉiam pli inklinas al la solvo, por kiu ni pledas. Tio oni facile rimarkas eĉ en konversacioj kun kleraj personoj, almenaŭ iom informitaj kaj pensantaj pri la fakta stato. Rezulto de multjara laŭplana kaj multdirekta agado de la neŭtrala UEA, dum la Hamburga Kongreso la ĉefa tono de la plej seriozaj raportoj en mondkonataj gazetoj estis, ke «Esperanto jam ĉesis esti revo kaj fariĝis kultura realaĵo»; ke la «Esperanto-Movado ĉesis esti «fermita sekto» kaj fariĝis rimarkinda faktoro en la internaciaj rilatoj».

Ĉio ĉi indikas, ke la nunaj eksteraj cirkonstancoj estas maturaj por nia solvo, sed oni ne povas antaŭvidi, ĉu ili longe restas tiaj.

Al la dua grupo de kondiĉoj apartenas unuavice forta, politike neŭtrala Esperanto-Movado kaj sana stato interne de ĝi. En la du jardekoj antaŭ julio 1974 UEA kiel tiama reprezentanto de la neŭtrala Esperanto-Movado daŭre vastigadis siajn agadojn kaj paralele fortikiĝadis intelekte, nombre kaj finance. Cent paĝoj da faktoj en ĉap. 18 de *Esperanto en Perspektivo* pravas tion. Samtempe altiĝis la prestiĝo de la organizaĵo. La Rezolucio de Unesko en 1954; la konsultaj rilatoj ekde tiu jaro, poste altigitaj al kategorio B; la proklamo de Zamenhof «granda personeco de la homaro» fare de Unesko en 1959; la kreskanta nombro da oficialaj reprezentantoj de registaroj en la inaŭguraj solenaĵoj de la Universalaj Kongresoj; la plej altaj ŝtataj funkciuloj - reĝino, prezidentoj aŭ vicprezidentoj de respublikoj - estas eksteraj signoj de la kreskanta prestiĝo de UEA. Kaj la prestiĝo estas gravega ne kiel memsufiĉa celo por si mem, sed kiel unu el la decidaj faktoroj pro atingi la interŝtatan konvencion kaj entute por la plua disvastigo de la lingvo. Krome ILEI, kiel vi bone scias, eklaboris sub la nuna gvidantaro multe pli bone ol iam antaŭe kaj entrenis diversajn agadojn, kiuj antaŭenigis la instruadon en la lernejoj. Fine, sed certe ne lastgrade, la lingvo mem plu evoluis kaj riĉiĝis per abunda nova kultura enhavo.

Ĉio, absolute ĉio indikas, ke la du grupoj de faktoroj konverĝas kaj ke estus eble entreni novan ofensivon, bone planitan kaj organizitan, por fine sukcesigi interŝtatan konvencion aŭ similspecan interkonsenton por deviga instruado de la Internacia Lingvo almenaŭ en difinita nombro da lernejoj kaj universitatoj de kiel eble plej multaj ŝtatoj. Siavice, atingo de tiu unua celo formus firman bazon blemo la eksteraj cirkonstancoj estis tiel favoraj, kiel nuntempe. La tuta lingva demando tiel komplikiĝis, kaj la antagonismoj inter la grandaj lingvoj fariĝis tiel netrasmonteblaj, ke ĉio necese puŝas la homojn al nia solvo. Sufiĉas memori, ke en UN kaj ĝenerale en la interŝtataj organizaĵoj apartenantaj al la familio de UN, en la tempo de iliaj fondiĝoj estis 5 oficialaj kaj nur du laboraj lingvoj, dum nun la diferenco inter la du kategorioj fakte malaperis kaj la nombro da laboraj lingvoj kreskis al 6. En la Eŭropa Komunuaĵo - gravega pro eventuala nova provo - estis 4 egale oficialaj lingvoj, nun estas 6, en kelkaj kazoj 7, baldaŭ verŝajne eĉ pli. Ne nur la franca, sed ankaŭ la angla estas forpuŝataj, ĉion ĉi ni antaŭvidis

por laŭgrada ĝeneraliĝo de Esperanto-instruado en ĉiuj lernejoj, sen kio la fina venko de Esperanto ne estas ebla.

Bedaŭrinde, la senrespondecaj misagadoj - por uzi ankoraŭfoje tre mildan esprimon - de difinitaj grupetoj interne de UEA kondukis al la tragikaj hamburgaj eventoj. Mi ne deziras paroli pri tiu afero. Abundaj dokumentoj kaj aliaj materialoj troviĝas en la ĵus publikigita *Hamburgo en retrospektivo*. la personoj, kiuj deziras informiĝi - kaj mi ja opinias, ke ĉiu serioza esperantisto devus esti informita - povas facile akiri tiun verkon kaj studi ĝin.

Unu jaron post la hamburgaj eventoj klare montriĝas, precipe kiel antaŭvite, ke UEA sub la nuna gvidantaro, certe ne kapablas treni kian ajn novan agadon rilate la interŝtatan konvencion. Eble ILEI, se ĝi restas fidela al si mem kaj plu fortikiĝas, povus sola ekagi ankaŭ en tiu direkto. En ĉiu okazo necesas konscii, ke temas pri grandega plurjara laboro, detale planita, perfekte organizita kja laŭgrade realigita. Ĝi devus konsisti el vasta propagandado de la ideo per ĉiuj disponeblaj rimedoj de informado; utiligado de la tuta jam ekzistanta dokumenta materialo kaj plua konstanta esplorado kaj dokumentado; organizo de internacia reto da kompetentaj kaj laborpretaj kunlaborantoj; konferencoj kaj seminarioj pri la temo; tre kompetenta centro kun la celo kunordigi la tutan agadon.

Mi esperas, ke mi sukcesis doni sufiĉe klaran bildon pri la afero. Se jam ILEI decidiĝos treni novan agadon por atingi interŝtatan konvencion, mi mem volonte helpo laŭ miaj eblecoj per konsiloj subaze de la akiritaj spertoj. Intertempe mi deziras al vi kaj al ILEI pliajn sukcesojn en via nuna laboro por vastigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj.

Elbendis kaj stenciligis la Dana Sekcio de ILEI.

Por viaj mendoj de Esperanto-libroj
turnu vin al

LIBROSERVO A. VALLERINI

Via Consoli del Mare, 15

I-56100 PIZO, Italujo

Tf. (050) 40604

Pĉk 22/10219

Transpreni sian laboron

tradukis P. Fort - Fontaine-les-Gres - F-10170 Mery s/ Seine - Francujo

Tre ofte en la klaso la infano ne sukcesas atenti pli ol kelkajn minutojn; oni asertas, ke la solvo estas malplilongigi la labordaŭron. Tamen ĉiu povas ĉiutage observi iun silentan infanon: dum horoj koncentrita al elektita faro (kondiĉe ke la adolto ne interrompu ĝin, asertante ke, ekzemple, «*ludi per akvo aŭ tero estas malbone*»).

La junulo, kutime konata kiel interesiganta pri nenio pasigos horojn por zorgi sian motorciklon aŭ reaŝkulti la ŝatatan diskon. Kial tiuj malsimilaj kondutoj? Ĉar tro ofte la tasko estas trudita sen pravigo («*tio pli poste estos utila al vi*»); en la dua kazo temas pri tasko libere elektita, kiun la adoltoj ofte nomas ludo (ĉar ĝi ne estas deviga), sed kiun nenio vere distingas de laboro: la meĥanikisto eble faras similajn agojn kiel la adoleskanto pri la motorciklo; la dommastrino faras similajn transversadojn, similajn gestojn kiel la etulo.

La Freinet-pedagogio apogas sin sur la libere elektitaj faroj, sed ĝi celas al ilia pliprofundigo, al ilia ligado kun bazaj eksperimentoj, kiuj permesos al la junulo pli bone kompreni por pli bone agi.

Ĝi kuraĝigas la infanon, la adoleskon por ke ili libere antaŭpreparu sian propran laborplanon, kiu ne estas simila al la aliaj. Por ke en la klaso estu harmonio, almenaŭ por uzado de la disponebla materialo, la organizado estas kooperative diskutita de ĉiuj lernantoj kun edukisto.

Kelkaj faroj estas pure individuaj laŭ la persona ritmo de ĉiu (sen rapidigi la lernanton, kiu bezonas tempon, sen moderigi la lernanton pli rapidan). Sed la infanoj povas ankaŭ libere grupiĝi en skipoj por iuj laboroj, en iuj laborejoj.

La adolto ne plu estas tiu, kiu unuforme kaj rigide reguligas la laboron; lia rolo estas helpi ĉiun, kunordigi, memori pri la promesoj kaj instigi al pliprofundigo. Lia rolo estas grava, kiam necesas fari sintezon de la realigitaj faroj.

Tio postulas

aliajn laborilojn.

La didaktita materialo antaŭvidita, por ke ĉiuj lernantoj faru samtempe la saman ekzercon, devas esti anstataŭita per eksperimenta materialo pli malpli rigida, kiu permesas grandan iniciativon. La sliparoj kun memkorektado, la programitaj libretoj permesas al ĉiu labori laŭ sia ritmo, sin mem korekti.

aliajn kontrolformojn

La rolo de la instruisto ne plu estas korekti per ruĝa inko, sed senpaneigi tiun, kiu ne povas sole elturniĝi. La kontrolo ne plu estu formala, sed interesiĝu pri profunda akirado (oni tro ofte konstatas, kiom malmulte restas el la sent motive lernitaj sciencoj). Grave estas, ke la junulo eksciis sin mem taksati, kaj ne, ke la instruisto disdonu cifernotojn (studoj pruvas, ke hazardo enŝoviĝas en tio).

Anstataŭ tranĉaj ekzamenoj, kiuj fermas la pordojn, kiam oni malsukcesas, kaj nur konstatas la mankojn sen klarigi ilin, ni kontraŭproponas pozitivan kontrolon dum la tuta lernotempo per fakaj diplomoj por ĉiu grava akiro.

Estraro de ILEI

- Prezidanto:** Rektoro Helmut Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen (Fed. Resp. Germanujo)
- Vicprezidanto:** Direktoro Johano Ingusz, Liget út. 40, H-1102 Budapeŝt X, (Hungarujo)
- Sekretario:** D-ro Mario Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa C., (Italujo)
- Vicsekretario:** S-ro Gaston Turin, 43 Rue Emile Magnin, F-25300 Pontarlier (Francujo)
- Kasisto:** S-ro Olle Osŝon, Bantorget 3, S-222 29 Lund (Svedujo).
p.ĝ.k. Stockholm 682 117-7.

Sekciestroj de la Ligo

- Aŭstralio:** Ivan Th. Maddern, Box 411, Morwell, Victoria 3840
- Aŭstrujo:** Margarethe Marischler, 1150 Johnstrasse 2, Vieno
- Belgujo:** G. Pirlot, Residentie «Vaughan», Kimmelbergstraat 3-5/b.3 B-8400 Oostende
- Brazilo:** Elvira Fontes, Caixa Postal 5888, São Paulo
- Britujo:** Raif Markarian, 87 Sebastian Ave., Shenfield, Brentwood, Essex CM15 8PP
- Bulgarujo:** Vasil Bozarov, ul. 1.jubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia
- Danlando:** Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre
- Finnlando:** Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82
- Francujo:** F. Le Magadure, 23 Rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont
- F.R.Germanujo:** Hermann Behrmann, Ellerbuscher Str. 81, D-4972 Löhne 1
- Grekujo:** Sokrates Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Kato Patissia, Ateno (816)
- Hispanujo:** Francisko Zaragoza Ruiz, Colegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante
- Hungarujo:** Marta Cser, Zelau út. 10-14, H-1368 Budapest V
- Islando:** Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavik
- Israelo:** Ron Aser, Raanana, Aŝer 5
- Italujo:** Catina Giulia Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C.
- Japanujo:** Gamon Higashi-cho 6-51, Koshigaya-shi 343
- Jugoslaviujo:** Miodgrad Stojanovič, Duruntorska ul. 2/IV-32, YU-11000 Beograd
- Kanado:** George du Temple, 930 Ardmore Drive, R.R.2, Sidney, B.C. V8L 3S1
- Kolombio:** Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellín
- Koreujo:** Dae Young-Rhie, 240-19, Sang-do-2-dong, Yong-dung-po Ku, Seoul
- Nederlando:** O. Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1719 Schoorl
- Norvegujo:** Elna Matland, Brekkeveien 50, N-4200 Sauda
- Nov-Zelando:** Gwenda Sutton, 1 Wood Street, Upper Hutt
- Pollando:** Teresa Nemere, str. J: Olbrachta 3/5 m 12, PL-87-100 Toruń
- Rumanujo:** Prof. D-ro Gabriel Tepelea, Calea Grivitei N-ro 222, Bloc 7, Scara B București 8
- Sanmarino:** Prof. Marina Michelotti, via XXV marzo 73, I-43031 Rep. S. Marino
- Sovet-Unio:** Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV
Nikolaj Starodubčev, poŝtrestante, SU-340047 Doneck
- Svedujo:** Olle Olsson, Bantorget 3, S-222-29 Lund
- Svislando:** Kurt Greutert, Via Pizzo di Claro 7, CH-6512 Giubiasco
- Usono:** John L. Lewine, West Stockbridge, MA 01266
- Kunlaborantaj organizoj aŭ izolitaj membroj**
- Ĉeĥoslovakujo:** Karel Kraft, poŝta 5, Zdobov V-28, CS-261 05 Přebram
- Germana DR:** Ludwig Schödl, Rosa Luxemburgstr. 37, DDR-195 Neuruppin
- Kubo:** Pedro Pablo Lamas Díaz, Apartado 223, Ciego de Avila
- Zairujo:** Antome-Samuel Nkangu, B.P. 13, Lukala (Nkandu)